


BONA ESPERO

REVUO DE
SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

VOLUMO: 1984/21
NUMERO: 3

ISSN 0006-7024



SEA ~ Sudafrika Esperanto-Asocio

BONA ESPERO

Revuo de la Sudafrika Esperanto-Asocio (SEA)
ISSN 0006-7024

Redaktoro: Cobus Zeelie
Sub-Redaktorino: Adèle Fouché

Ĉi tiu revuo trimonata aperas en marto, junio, septembro kaj decembro ĉiujare.

La redakcio preferas maŝinskribitajn kontribuaĵojn. Manuskriptoj nepublikigitaj ne resendiĝos. Nek la redakcio nek SEA respondecas pri la enhavo de anoncoj aŭ promesoj faritaj en ili.

Redakcia adreso: P.O. Box 12271
Centrahil
Port Elizabeth 6006
South Africa

Prezo: Membroj de SEA - Senpage
Nemembroj - Abonu pere de la SEA kasisto
P.O. Box 1227
Cape Town 8000
South Africa

Estraro de SEA: Prezidanto - E de Kock
Vic-Prezidanto - A von Blottnitz
Sekretario - O Sher
Kasisto - C S Beckford
Komitatanoj - H W Appel
A K Fouché
J Hammes
F M Woolf

Ĉiuj asocioj, societoj, kluboj kaj aliaj, kiuj regule alsendas gazetojn, novaĵajn leterojn ktp, bonvolu sendi al la redaktoro de BONA ESPERO.

ĈEFARTIKOLO

Lasu la ĉapeletojn sur niaj literoj! (E de Kock) 1

ARTIKOLOJ/RAKONTOJ

Aŭŝtralia Esperanto-movado 3
Kontribuas samideano de Kongolando 5
Kiom da telefonoj estas en la mondo? 6
Internaciaj ekzamenoj 6
Raporto pri la vizito de Juhani Vilkki (A von
Blottnitz) 7
Tiel venena kiel... 8
Difinoj (H W Appel) 10
Kiu inventis la poŝton? 12
Tiu kompleza strangaĵo: la struto 12
La plej vendata Esperanto-libro 16
Esperanto-edukado internacia - novaj progresoj 20

RUBRIKOJ

Venteraĵoj (E S Venter) 11
Recenzo 14
Trilingva artikolo 15
Ridetu 17
El la scienco 18
La mondo 19
Novaj libroj 21
L'inkpoto 23

ANONCOJ 21

REDAKCIE

Ankoraŭ nesufiĉa materialo originala 3
Komunikaĵo al niaj legantoj 4

ĈEFA ARTIKOLO (En tri partoj)LASU LA ĈAPELETOJN SUR NIAJ LITEROJ!

Laŭ diversaj voĉoj leviĝantaj de tempo al tempo, lastatempe eĉ inter gramatikistoj respektataj, Esperanton oni rifuzos enkonduki mondscale pro ĝiaj ĉapelitaj literoj. Denove venas proponoj forigi ilin. Tium ideon ni rifuzu kiel eraran, pro almenaŭ la jenaj kialoj:

Unue, la Zamenhofa ortografio montriĝis tute taŭga. Ĝi estas fonologie adekvata, malgraŭ ĉikanetoj, kaj bone respegulas la sonsistemon de la lingvo. Anstataŭigi la literojn cirkumfleksajn per duliteroj prezentus retropaŝon el vidpunkto lingvistika. Nian skribmanieron la Esperantistoj trovas oportuna.

Due, temas pri tradicio jam preskaŭ centjara, bone establita. Tiaĵojn oni ne povas, nek rajtas, ŝanĝi laŭ maniero arbitra. Ĉu la proponintoj samaplombe riskos siajn eldirojn por pravigi la forĵeton de la signoj diakritaj en la Franca, la Germana, la Hispana, la Itala kaj la Portugala - aŭ eĉ la Afrikansa, kiu oficialiĝis nur dum 1925, akirinte la nunan ortografion multe pli malfrue ol Esperanto? Kompreneble ne tion ili klopodos. Kaj kial ne? Ĉar la Francan, la Germanan, la Italian, la Portugalan kaj la Afrikansan - kune kun multaj aliaj - ili rekonas kiel verajn lingvojn! Nur Esperanto ne! Kiuj tamen rekonas, ke la brila kreaĵo de Zamenhof jam ĉesis roli kiel nura projekto, fariĝinte lingvo plenrajta, tiuj respektos ankaŭ ĝian ortografion.

Trie, la literoj ĉapeletaj konsistigas genian ilon Zamenhofan respeguli la fontojn de la lingvo, tiel reliefigante ĝiajn rilatojn kun grandaj kulturoj multjarcentaj. Tiu-maniere la vortoj akiras gravan ŝargitecon per asocioj gravaj por la literaturo, kio estas bona respondo al niaj kritikantoj inter la kulturularo. Ni notu, ke tiel la iniciantinto de Esperanto kunfandis elementojn diverslingvajn - kiel cetere jam atentigis Gaston Waringhien

(la poeto 'Maura') en unu el siaj eseoj, ĉiam pensigaj. Ekzemple la cirkumfleksa 'ĝ' de ĝardeno aludas samtempe (per sia sono aŭ aspekto) la Francan jardin, la Italian giardino, la Anglan garden kaj la Germanan Garten - por ne iri plu. Estas bedaŭrinda misopinio, kiu postulus la forigon de tiu riĉeto. Elimini la ĉapeletojn efektive lezus nian lingvon mem.

Kvare, oni ne ŝanĝas la ortografion, krom se ekzistas en ĝi vere gravaj malhelpoj, sentataj far¹multaj homoj, ne manpleno da reformemuloj. Tiaj kaŭzoj povas esti, ekzemple troa malfacileco, kiel ĉe la ideograma sistemo Ĉina, aŭ neaktualiĝo - post multjarcenta uzado - pro tio, ke jam tro diverĝas la sonoj de iu lingvo dis²ilia reprezento grafisma. Tiel oni jam adaptis, interalie, la skribmanieron de la Germana kaj la Nederlanda - kaj malsukcese proponis diversuloj ankaŭ por la Angla kiu draste bezonas novan ortografion. Por esti vere celtaŭga ĉi tio preskaŭ certe devos havi supersignojn. Apenaŭ povas ekzisti alia lingvo okcidenta kun sistemo tiel problema kaj eksmoda, ĉar elitisme bazita sur konsideroj etimologiaj. Ĝi taŭgas ĉefe por poliglotoj kiuj scipovas plurajn lingvojn fremdajn precipe la Klasikajn kaj la Francan. Verŝajne neniu Anglo povas ĝin literumi senerare. Krome ĝia ortografio ne estas reformebla, nur funde ŝanĝenda; ĉar la ordinara alfabeto Latina ne havas sufiĉe da literoj. Ekzemple troviĝas en la Angla dek du vokaloj simplaj, por ne enkalkuli la diftongojn kaj triftongojn! Tial mi trovas tion preskaŭ nekredible, ke iuj reformemuloj inter ni nun miscele laŭdas ĝuste tiun literumadon, dezirante ke ni Esperantistoj sekvu ĝian ekzemplon. Prefere ni atentu la pravan eldiron de William Auld, ke la Angla alfabeto taŭgas eĉ ne por la Angla.

(Daŭrigota)

Ewin de Kock, Akademiano (Sudafriko)

Parto II en
1984/21/4

Red. noto: 1) Far = de (angl of, afr van)
2) Dis = de (angl from, afr van)

ANKORAŬ NESUFICĤA MATERIALO ORIGINALA

La redakcia tasko estas neniel facila. Kvankam kelkaj petoj por kontribuaĵoj de tempo al tempo aperas en nia revuo, multaj personoj reagis. Por klarigi al si mem la tre strangan nevolemon kontraŭ ĉi tiu malgranda peto, la redakcio nun kredas, ke.....

Temas pri kvar (kvin?) legantoj de BONA ESPERO. La nomoj: Ĉiu, Neniu, Iu kaj Iu-Ajn.

Niaj kvar amikoj ne deziris vidi la nomon de la revuo ŝanĝiĝi al MALBONA ESPERO. Do, ili decidis ensendi artikolon. Ĉiu estis certa, ke Iu faros la taskon. Iu-Ajn kapablas fari tion, sed Neniu reagis. Iu koleriĝis pri la afero, ĉar li opiniis tion la taskon de Ĉiu. Tamen, Ĉiu siaflanke inklinas pensi, ke Iu-Ajn kapablas fari tion. La vero estas, ke Neniu sciis, ke Ĉiu ne faros tion. Fine, Ĉiu kulpigis Iu-n eltrovinte, ke Neniu verkis artikolon - tasko, kiun kapablas fari Iu-Ajn.

La redakcio nun volas eltrovi kiu kulpas: Ĉiu, Neniu, Iu, Iu-Ajn.....aŭ VI?

Redaktoro

AŬSTRALIA ESPERANTO-MOVADO

La aŭstralia Esperanto-movado estas bona ekzemplo de progresemo - kun sukceso! Dum 25 jaroj post la fondiĝo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA), Esperanto - kiel en multaj aliaj landoj - nur ekzistis sed ne kreskis. Tiam aranĝis en 1950 la unuan kongreson Herbert Koppel, redaktoro de The Australian Esperantist. Tiumaniere li tiel entuziasmigis la membrojn, ke ekde tiam okazas aŭstralia kongreso ĉiun duan jaron. Pro la grandaj distancoj inter la aŭstraliaj urboj ĉiujara kongreso ne eblas. Tamen por igi la membrojn ĉeestis-ro Koppel planis kelkajn allogaĵojn.

Dum la kongresoj, interalie, teatraj grupoj el ĉiuj la grandaj urboj partoprenas diversajn 20-minutajn skeĉojn por kiuj la plej bona grupo ricevas trofeon nomitan "Drama-Ŝildo". La trofeo estas gardata dum du jaroj ĝis la sekvanta kongreso kiam la pasintaj venkintoj transdonas ĝin al la novaj. Pro bonfarita laboro la plej meritplena membro ricevas "Honor-Insigno"-n kiu rajtigas al li skribi la literojn FAEA (Fellow of the Australian Esperanto Association/Fratulo de la AEA) post sia nomo.

Por realigi la ĉi-suprajn, la membrokosto estas iom alta (\$20 aŭstraliaj jare), sed la membroj volonte pagas. La asocio publikigas revuon modeste 10-paĝan, dukoloran, glospaperan kiu aperas naŭfoje dum ĉiu jaro. Demandojn adresu al: Herbert Koppel, Redaktoro de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST, 41 Byfield Street, Reservoir, 3073, Melbourne, Australia.

KOMUNIKAĴO AL NIAJ LEGANTOJ

En la jena kodomesaĝo vi trovos kiel ankaŭ vi povas ludi rolon sukcesigi Esperanton. Deĉifru antaŭ ol turni al paĝo 10 por la solvo:

2,25,23,2,24,1,22,26,4/27,3,27,1,25/22,5,24/19,3,1,
21/27,3/1,19,26,3,27,1,25/23,24,3/22,3,1/13,2,20,4.

Jen kelkaj indikiloj:

A = 1; Ĉ = 6; Ŭ = 11; B = 12

KONTRIBUAS SAMIDEANO DE KONGOLANDO!

Kun multa ĝojo la redakcio ricevis sian unuan kontribuajon de samideano en Pointe Noire, Kongolando. En BE/84/21/2 la sub-redaktoriĝo, en ŝia raporto pri PEK, anoncis, ke la redakcio entreprenis interkontakton kun la cetero de Afriko. Post kelkaj UEA artikoloj pri la izoleco de la afrikaj Esperantistoj (kun la escepto de SEA kiu estas unu el nur du landaj asocioj kaj la sola kun landa revuo) ni decidis akiri la adresojn de afrikaj samideanoj kiuj estas membroj de UEA. UEA kiu tre entuziasmiĝis pri nia celo tuj sendis preskaŭ dek adresojn. Al tiuj personoj la redakcio sendis klarigan skribaĵon pri la interkontakta entrepreno kaj post nelonge ni ricevis la unuan respondon el Kongo.

Lourenco Capitz estas konga samideano kiu eklernis Esperanton antaŭ nur unu jaro kaj intertempe li jam varbis kvin novajn membrojn. Kvankam la grupo estas ankoraŭ malgranda, Lourenco kiu estas ankaŭ la nuna kursgvidanto promesas, ke la membroj estas tre aktivaj kaj la membronombro nerapide sed certe kreskas. Li ensendis la jenajn du anekdotojn:

: Internaciskale konata politikisto paroladas al grupo de eminentuloj. Subite unu persono stariĝas: "Mi bedaŭras kaj pardonpetas pro la interrompo, sinjoro, sed ĉu estas permesate ion diri?"

"Bonvolu, sinjoro."

"Via parolado, efektive, estas ne pli ol digna laksigilo!"

"Jes?.....Kaj vi, via moŝto, la honora laksigaĵo?!"

: "Amiko, bonvolu diri al mi kie estas la sunleviĝo. Ĉu en la okcidento aŭ en la oriento?"

"Kamarado, ne petu tion de mi! Des pli ĉar mi ne loĝas tie ĉi. Estante fremdulo, kiel mi koni tiun kvartalon?"

Ensendis Lourenco Capitz (Kongolando)

KIOM DA TELEFONOJ ESTAS EN LA MONDO?

Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Belgio; ☎ (03) 651 46 36.

Hungario; ☎ (72) 23-274.

☎ (061) 226 8101 (en Brasilia).

Laŭ la informoj publikigitaj lastatempe en la jarlibro pri disvolviĝo de la telefonaj komunikiloj en la mondo, prilaboritaj de specialistoj de la firmo 'Simens' (GFR), 100 loĝantoj sur nia plendo posedas po 11,5 telefonaparatoj. Fruntloke staras Aŭstralio, Nov-Zelando kaj Oceanio kie ĉiuj 100 loĝantoj posedas po 42 telefonaparatoj. Pri Norda kaj Suda Ameriko tiu indekso estas 36, pri Eŭropo 28, pri Azio 3 kaj pri Afriko 1,3. Dum 1981 estis en la mondo 510 000 000 da telefonabonantoj.

Plej parolemaj per telefono estas la civitanoj de Usono kie dum 1980 estas registritaj 257 miliardoj da telefon-
alvokoj.

:: :: :: :: :: :: ::

INTERNACIAJ EKZAMENOJ

Dum la 68-a UK en Budapeŝto UEA unuafoje ofertis la eblecon fari elementan kaj mezan ekzamenojn pri Esperanto por tiuj kongresanoj, kiuj deziras posedi ateston pri sia lingva kapablo. La ekzamenoj de UEA estas intencitaj ĉefe - sed ne nur - por la landoj sen ekzamena servo.

La intenco de Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) estas, ke ekzamenoj fariĝu tradicia ero de la UK-oj.

Ambaŭ ekzamenoj havas skriban kaj parolan partojn. Oni

diferencigas la ekzamenojn laŭ enhavo kaj amplekso de la materialo jene -

1. La elementa ekzameno ebligu la konstaton, ĉu la kandidato scipovas skribe kaj parole komuniki en Esperanto en tipaj kongresaj cirkonstancoj
2. La meza ekzameno ebligu la konstaton, ĉu la kandidato scipovas skribe kaj parole komuniki en Esperanto en ĝeneralaj (ankaŭ eksterkongresaj) cirkonstancoj

Pliajn detalojn pri la ekzamenoj: G Tucker, IEK, Lilienthalstr. 3, D-8900 Augsburg, FRG.

RAPORTO PRI LA VIZITO DE JUHANI VILKKI (FINNLANDO):

16 12 83 - 29 02 84

Juhani produktadas legomojn sen sterko kaj sen aliaj ĥemiaj produktaĵoj en la urbo Somero, Finnlando. Vintre li kutime vojaĝas al landoj en la alia mond-duonsfero kie li tiam laboras. Lia patro estis la ĉefdelegito por Finnlando kaj li mem ĉeestis kelkajn kongresojn (12 de 1950 ĝis 1980) de UEA.

Juhani jam laboris 5 jarojn en Novgineo, 2 en Aŭstralio, 2 en Hispanio kaj 2 en Svedio. Ties lingvojn li regas. Li ankaŭ antaŭe vizitis mallonge Sud- kaj Centran Amerikon, Usonon, Kanadon, Israelon, Egiptujon, Lebanon, Hindujon, Bangkok, Singapuron, Filipinojn, Japanion, Guamon, Saipan.

En Afriko vizitiĝis nur dum kelkaj tagoj Maroko, Alĝerio, Tunezio, Kenjo, Tanzanio. En Sudafriko li deĵoris por agrikultura ĥemia firmao. Dum tiu ĉi tempo li renkontis samideanojn en Witrivier, Pietermaritzburgo, Portelizabeto, Blumfonteno, Pretorio, Kaburbo, Svaŝilando, Masero.

Die Transvaler, post intervjuo kiun aranĝis Jan Strydom,

TIEL VENENA KIEL.....

Ho, kiel ofte la homo uzas tiujn vortojn por detruie priskribi personon, kiun li ne ŝatas! Tamen, ĉu tiuj homoj tute pravas? Estas ja bone, ke tiaj emociaj kaj venenaj pikistoj ne konscias la veran staton de aferoj!

Krom la homo mem, nia mondo estas plena de venenaj kreaĵoj. Inter ĉi tiuj estas la usona ermit-araneo, la ruĝnigra araneo de Aŭstralio, la buton-araneo de Sudafriko, la funel-araneaĵa araneo de Suda Kimrujo kaj la bonkonata 'nigra vidvino'.

Aldone al tiuj hirtaj teroristoj estas la tre venena skorpiono Androctonis Australis, la ŝtonfiŝo de la Indo-Pacifika Oceano kaj la plej venena heliko en la mondo, la konus-heliko. La ŝtonfiŝo posedas 13 pikilojn per kiuj ĝi injektas sian neŭrotoksinon. La konus-heliko paralizas sian viktimon per fluido injektita tra nadlotipa dento.

Preskaŭ 40 000 homoj mortas ĉiujare pro serpentveneno kaj 75% el tiuj okazas en Hundujo kie troviĝas la reĝokobro. La tigroserpento de Suda Aŭstralio estas tiel venena, ke nur 0,6mg de ĝia veneno mortigos plenkreskulon. Alia venena serpento estas la klakserpento de la sudokcidentaj partoj de Usono. Ĝia veneno sufiĉas mortigi 30 homojn.

Tamen, inter la plej danĝeraj venenoj ne troviĝas tiu de serpento, sed ja de la kolomba rano Kokoa. La venenon nomitan Batrakotoksinon, ĝi ne uzas por ataki, sed nur por sindefendo, kaj sekrecias ĝin surhaŭte. La toksino estas tiel forta, ke 0,1mg necesigas ekprenegon de la testamento!

Kaj se vi opinias tion grava - atentu: la plej venenajn animalojn oni trovas en la maro. La bluringa polpo de la Pacifika Oceano mordas sian venenon en viktimon kaj tiu ĉi eĉ ne disponas la tempon por ekprenegi tiun testamenton - ĉirkaŭ 2 horoj ĝis mortiĝo. Kvankam sciencistoj jam konas la ĝemian strukturon de la veneno, ĝia efiko estas

tiel rapida, ke kontraŭveneno estas neutila.

Distancigu ankaŭ la maran vespon, kiu efektive estas tipo de meduzo. Nur unu piko de tiu ĉi kaŭzas, ke la homa viktimo ŝvitegu; perdu sian vidkapablon, senŝpiriĝu - kaj aldone mortu poste! Ĝi troviĝas en la marakvoj de Kvinslando, Aŭstralio.

Vere ŝajnas, ke ju pli malgranda, des pli danĝera! Ekzemple la mikroskopa Clostridium botulinum: kvankam ĝia nomo estas milfoje tiel granda, kiel la ĝermo mem, ĝia toksino estas tiel venena, ke - en scienca eksperimento - lmg mortigis milionon da musoj. Multe malpli da botulino (nomo de la toksino) kaŭzas en la homo nutraĵveneniĝon (botulismon). Ĝis nun la plej venena toksino surtera, oni timas pri ĝia ebla uzado en biologia milito.

Restas ankoraŭ unu malamiko, kiun oni ne forgesu. Eble ne tiel venena, sed certe la plej danĝera el ĉiaj malamikoj. Ties iloj pikas dolore, kaŭzante gravan psikologian kaj fizikan difektojn. Kiam agpreta, nenio kaj neniu estas sufiĉe sindefenda kontraŭ atako de tiu, ofte eĉ ne tiu mem - la homo!!

LA PETO

Mi petis, ke Dio helpu min trovi la amon
 Li respondis: Vi estas la amo

Mi petis, ke Dio helpu min trovi la celon
 Li respondis: Vi estas la celo

Mi petis, ke Dio helpu min trovi la veron
 Li respondis: Vi estas la vero

Tiam Dio diris: Kiam vi trovos min, demandojn vi ne havos



MESAĜO AL NIAJ LEGANTOJ

Ŝlosilo al kodo: A,E,I,O,U = 1,2,3,4,5

Ĉ,Ĝ,Ĥ,Ĵ,Ŝ = 6,7,8,9,10

Ŭ = 11

B,C,D,F ĝis Z = 12,13,14,15 ĝis 28

DIFINOJ

Socialismo: Vi havas du bovinojn, sed la registaro ordonas al vi doni unu al via maldiligenta najbaro.

Komunismo: Vi havas du bovinojn, sed la registaro prenas ambaŭ kaj donas al vi kvaronon de la lakto.

Faŝismo: Vi havas du bovinojn, sed la registaro prenas ambaŭ kaj vendas al vi la lakton.

Naziismo: Vi havas du bovinojn, sed la registaro prenas ambaŭ kaj pafas vin.

Kapitalismo: Vi havas du bovinojn, sed vi vendas unu kaj aĉetas virbovon.

Ensendis: H W Appel (Sudafriko)


... ..

NEKROLOGO

Malĝoja novaĵo estas la forpaso, la 7-an de aŭgusto, de Irene Schilperoord, edzino de Peter Schilperoord de Londono. Kelkajn horojn antaŭ ol iri al la flughaveno por revenflugo de Vankuvero al Londono, Irene estis trafita de apopleksio. Sia morto vere estas granda perdo al la tuta Esperanta movado. Niajn sincerajn kondolencojn al Peter.

: : : : : :

Dum novembro de 1983 mi helpis mian najbaron ĉe sia granda terpomkampo.



La najbaro ankaŭ dungis grandan aron de nigraj virinoj. La nigrulinoj de tiu regiono neniam aŭ malofte kulturas legomojn sed havas mirindan konon pri manĝeblaj plantoj. Ĉiu ino havas, pendante de sur sia kolo, ujon el faldita tuko en kion ŝi metas dumlabore trovitan 'maroĥ' - sovaĝan legomon kiu kaŭzas ebriecon. Ofte iliaj filinetoj estas kunigataj por libere eltiri maroĥplantojn. Laborfine ĉiu hejmenportas, krom sia pagon, grandan pakajoŝon da "maroĥ".

Postlabore granda aŭtobuso portas ilin hejmen, grandaj pakajoŝoj subbrake. Kutime aŭdiĝas laŭta kaj gaja kantado dum la duonhora veturo hejmen.

Unu vesperon estis problemo rilate la akiro de mono ĉe la banko. Ĉirkaŭ 30 viĝoj rifuzis iri hejmen, deklarante ke siaj edzoj/patroj bastonbatos ilin se ili alvenis hejmen sen mono. Ĉie ili ekkuŝis sur la plankoj de la enpakkontruajo. Iuj tamen profitis la okazon kaptante akridojn - allogataj de la elektra lumo - je manplenoj. La postan matenon antaŭ sunleviĝo nombro da inoj ree kaptadis akridojn, ĉi-foje malviglaj pro la nokta malvarmo. Interesaĵo estas, ke la tre severaj prahebreaĵ manĝaĵreguloj permesis akridmanĝadon. Alivorte, deklaris tion tute "koŝr". Raŭpojn, siasezone, ili ankaŭ ŝatas manĝi - fakte speco de kaviaro por ili.

Tion ĉi mi speciale verkis se okaze la persono de Kancerkliniko ree elvomas interesaĵojn pri mi.....

E S Venter (Sudafriko)

KIU INVENTIS LA POŜTON?

La itala civitano Franŝesko Taso, kiu vivis antaŭ 500 jaroj en sia patrujo, estas konsiderata kiel fondinto de la unua poŝta servo en Eŭropo. Kaj malgraŭ, ke multaj historiistoj dubas pri li kiel kreinto de tiu servo, tamen la italoj estimas lin kiel la unuan pioniron de la poŝta afero. Liaj dankemaj posteuloj trovis manieron dediĉi tagon al lia memoro lige kun la 465-a datreveno de post lia morto. Proponate de la familio Taso, en unu el la presejoj estas preparita kaj jam eldonita poŝtmarko dediĉita al la kreo de la unua eŭropa poŝto, kaj sur ĝi estas gravurita la portreto de Franŝesko Taso.

TIU KOMPLEZA STRANGAĴO: LA STRUTO

Se ankaŭ vi opinias, ke struto estas stultestranga birdo, kiu neniam sukcesis enaeriĝi, konsideru:

- : La struto moviĝas plenrapide po 80 kilometroj ĉiuhore kaj faras tion per 3-metraĵ paŝegoj. Laŭ surteraj rapidecoj, tio estas la plej rapida post nur la leopardo. Je konstantaj 35 kilometroj ĉiuhore ĝi kapablas kuri senhalte ĝis dek horoj.
- : Ĝia vidkapablo estas tiel bona, ke ĝi povas distingi malamikon je distanco de 10 kilometroj. Ĝi kutime penas distancigi sin de siaj malamikoj, sed se enanguligita facile elstomakigos sian atakanton per rapida piedfrapo. Eĉ la fiera leono senhonte montras gravan respekton!
- : La struto estas majstro de la kamuflado. Kun la kapo kaj la kolo tuj apude de la tero, ĝi aliformigas bulkon tiamaniere similante arbeton, rokon aŭ formikejon. La

griza strutino sidas sur siaj nokte la nigra virstruto por mem prizorgi la elko-

: Dum 800 milionoj da jaroj sian pizgrandan cerbon por nur kelkaj afrikaj animalcataj de estingiĝo.

La egiptoj respektigis ilin kredante, ke la plumoj simbolicas la veron kaj la justecon. Nur la faraonoj rajtis porti la grandajn plumojn.

La struto manĝas preskaŭ ĉion, ŝajne preferas brilajn objektojn monerojn, diamantojn, metalaĵojn ktp. trovo de 53 gemoj en la stomako de rezultigis en la mortigado de toj en Sudokcident-Afriko.

En la mezo de la dek-naŭa kaj sudafrikaj farmistoj tre adapteblajn birdojn. tiujn farmistojn tiel stulta kiel la kiujn ili prizorgis. Tamen, post farmistoj pruvis kiel malpravaj kritikantoj.

Hodiaŭ strutfarmistoj enspezas R25 000 000 ĉiujare. La centro estas en la sudkablada urbo Oudtshoorn, kie troviĝas 97% de la mondaj alhejmigitaj strutoj sur ne malpli ol 350 farmbieno.

Ĉiun birdon oni senplumigas ĉiun monaton; la plumoj de unu struto vendiĝas por R80 - R150. Korpajn plumojn oni uzas por boaoj aŭ vestornamoj, kaj la pli mallongajn por plumviŝiloj. Struto kreskigas uzeblajn plumojn dum dek kvin jaroj.

ovoj dumtage sed flankenpuŝas ŝin van taskon.

ĝi efike uzis fariĝi unu el specoj ne mina-




sed ver-
kiajn
Iufoje la
unu birdo
multaj stru-

jarcento kel-
alhejmigis la
Multaj opiniis
strutoj mem,
nelonge tiuj
ja estis iliaj

Pli ol 98% de la struto estas utiligita: plumaj produktoj, haŭtoj por vestaĵoj, kuiraj grasoj por sapo, kuirado kaj medicinaj ktp. Eĉ la 6,5cm piedfingra ungo faras bonan paperpremilon. La viandon - 800 tunojn en unu jaro - oni opinias frandaĵo. Preskaŭ 40 000 haŭtoj vendiĝas ĉiun jaron po R200. Struthaŭta vesperĵako en butikoj kiel Hérmes de Parizo kostas ĉirkaŭ R3 870!

La struto havas bonan kialon por teni la kapon alta. Tiu stranga birdo jam ree pruvis sian utilecon, kaj hodiaŭ ankoraŭ post multaj jaroj, ekzistas por doni ĝuon al ĉiuj.



RECENZO

Esperanto Aŭtodidakte: Internacia lernolibro de la Internacia Lingvo. Audrey Childs-Mee. Antwerpen/La Laguna: TK/Stafeto. 194 + 40p. Ilustrita de S.

Markoviĉ. 21 cm. 24,00 gld. ISBN 90 6336 029 0.

Tiu ĉi nova lernolibro ambicias samtempe internaciecon kaj aŭtodidaktecon, t.e. malfacile atingeblan duoblan celon. La lernolibroj sen nacilingvaj klarigoj estas kutime destinitaj al rektametoda kurso, kaj por tia kurso la verko certe povas taŭgi. Ĝi prezentiĝas pli moderna, sed pli modesta laŭ la leksika enhavo, ol JUNULKURSO aŭ PRIVILEGIA VOJO. Ĉu la aŭtodidaktado ĝuste komprenos ĉiujn vortojn kaj frazojn helpe de la bildoj? Tion montros la praktiko. Unuavide oni povas diri, ke la bildoj de Stano Markoviĉ estas ĝenerale trafaj.

La progreso estas tre malrapida, kio tute taŭgas por la celo de tiu metodo. Demandoj kaj respondoj estas farataj ĝis enkapigo de la koncernaj nocioj kaj vortoj.

AFR-ESP-ENG

TRILINGVA ARTIKOLO


El Parolo de D-ro Zamenhof en la 5-a UK en Barcelona, 1909: Vi scias, kia estas nia celo; vi scias, kia estas la sola vojo per kiu ni povas atingi tiun celon; ni marŝu do antaŭen diligente kaj harmonie. Se ni demandas nin, kion ni faris en la ĵus finiĝinta interkongresa jaro, ni povos respondi: "Ni sane vivis, ni kreskis, ni fortiĝis en ĉiuj rilatoj." Kian grandan signifon tio havas; tion povas kompreni nur tiuj, kiuj komprenas la tutan gravecon kaj malfacilecon de nia afero, kaj kiuj mem laboras por ĝi. Kiel en la jaroj pasintaj, tiel ankaŭ en la jaro ĵus finiĝinta, multaj el vi laboris por nia komuna afero kun granda fervoro kaj sindoneco; al ili la Esperantistaro esprimas sian koran dankon.

Uit 'n Toespraak van Dr. Zamenhof tydens die 5-e UK in Barcelona, 1909: U weet wat ons mikpunt is; u weet wat die enigste weg is om daardie mikpunt te bereik; laat ons dus pligsgetrou en harmonieus voortgaan. As ons onself afvra wat ons in die pas afgeloepe interkongresjaar ge- doen het, kan ons antwoord: "Ons het op 'n gesonde wyse geleef, ons het gegroei, ons het in alle aspekte sterk ge- word." Watter groot betekenis het dit (nie); dit kan slegs hulle wat die volle belangrikheid en probleme van ons doel verstaan en wat hulself daarvoor beywer, begryp. Soos in die jare wat verby is so ook in die jaar wat pas voltooi is, het baie van u met groot gretigheid en beywering vir ons gesamentlike doel gewerk; aan hulle dra die groep Esperantiste hulle hartlike dank oor.

From a Speech by Dr Zamenhof at the 5-th UC in Barcelona, 1909: You know what our goal is; you know what the only way by which we can reach that goal is; let us therefore march forward diligently and harmoniously. If we ask ourselves what we have done in the intercongress year just finished, we can reply: "We lived in good health, we grew, we became strong in all respects". What great significance that has; only those who understand the full importance and difficulty of our cause and who themselves work for it

(Recenzo: de p 14)

La plej kompetentan prijuĝon de tiu lernolibro faros la kursgvidantoj kaj lernantoj, kiuj ĝin uzos. La verko nepre meritas ilian atenton.

Michel Duc Goninaz en ESPERANTO

LA PLEJ VENDATA ESPERANTO-LIBRO

Ĝus aperis la 5-a eldono de la perfektiga antologia lernokaj legolibro "Paŝoj al plena posedo" de William Auld.

Eldonita ĝis nun en entute pli ol 20 000 ekzempleroj, la menciita verko estas la plej sukcesa kaj la plej vendata libro en la tuta historio de la internacia lingvo.

En 230 paĝoj, la perfektiga lernolibro prezentas 30 lecionojn kun entute 180 lingvaj ekzercoj. Al ĉiu leciono estas aldonita literaturaĵo: entute, la studanto trovas en la verko 18 originalajn kaj 12 tradukitajn beletrajn legaĵojn. La originalaj verkoj fontas el la plumo de la plej famaj Esperanto-stilistoj, de Zamenhof ĝis Kalocsay, Szilagy k.a.

Prezo: 18,5 gld. (UEA) aŭ egalvalora ĉe via libroservo.

: : : : : : : :

Ekzistas.....

Tiuj, kiuj - kaŭzas, ke io okazas
 Tiuj, kiuj - vidas, ke io okazas
 Tiuj, kiuj - miras pri kio okazas
 Tiuj, kiuj - scivolas pri kio okazas
 Tiuj, kiuj - scias pri kio okazas

En kiu grupo troviĝas vi, kara leganto?
 Bonvolu kontribui al via revuo. Hodiaŭ!



RIDETU



"Sed, vi ja scias, ke ĉi-tio estas ŝatata Esperanto-programo!"



"Nia plej nova komputilo. Tre malmultekoste funkciigi..."

Eminenta scienculo tre ŝatis sian katinon. Por ke ŝi libere povu eniri la ĝardenon, li faris grandan truon en la dompordo. Tiel ŝi nun povis senĝene eliri kaj reveni en la domon. Unutage ŝi naskis katiidojn kaj la scienculo rapidis fa-

ri alian malgrandan truon por la idoj, por ke ili same povu eliri en la freŝan aeron.

... ..

Direktoro de frenezulejo vidas, ke iu malsanulo ŝovas radportilon la supron malsupre.


"Kial inverse?" li milde demandas.

"Vi pensas, ke mi estas freneza, ĉu ne? Hieraŭ mi tenis ĝin alimaniere kaj ili daŭre plenigis ĝin per pezaj ŝtonoj...."

... ..



"Ne mensogu! Vi mordis lin!"



EL LA SCIENCO

Elemento:	Virino
Simbolo:	TNT
Atoma Nombro:	36-24-36
Atoma pezo:	Teorie 50Kg sed praktike pli alta
Trovloko:	Apud la viroj kaj malofte en la libera ŝtato
Fizike:	Koloro.....Bruna en la somero kaj roz- kolora en la vintro
	Aspekto.....Ĝenerale rondforma
	Odoro.....Tre agrabla
	Resonado.....Faras altdecibelajn sonojn sub cirkonstancoj de premo
	Duonvivo.....Al la nuda okulo ĝi ŝajne neniam plialtiĝas, sed ĥe- mie oni povas pruvi, ke ĝi fakte rapide maljuniĝas
	Brulpunkto.....Brulas pro nenio kaj gla- ciiĝas senaverte
	Kolapspunkto.....Ne tro alta
Ĥemie:	Tre aktiva kaj agas forte se lasita sola
	Fariĝas verda se metita apud pli bonaspekta specimeno
	Reagas vole-nevole en la ĉeesto de karbohidra- toj kaj proteinoj. Tiuj ĉi rezultigas nenormalan pli- iĝon de la atoma pezo
	Posedas grandan emon por la multekostaj ĝem- ŝtonoj kaj ankaŭ la metaloj oro, arĝento kaj plateno
Uzoj:	Tre ornama
	Egaligas la distribuon de riĉoj
	La plej forta ekonomia reduktilo konata al la viro
	Utila por kelkaj aliaj taskoj sed ne trouzu - ĝi facile rompiĝas
Avertoj:	Tute neantaŭdirebla kaj tre eksplodema en la manoj de nespertuloj

(Juhani Vilkki: de p 17)

aperigis longan artikolon pri lia vizito.

Post sia resto Juhani flugis al Luksemburgo. Li ankaŭ planas viziti amikojn en Francujo post kio li iros hejmen kie lia patrino dume estris la bieneton.

Varmajn salutojn al Juhani Villki de liaj novaj sudafrikaj amikoj!

Axel von Blottnitz (Sudafriko)



:Radio Polonia nun dissendas sesfojojn ĉiutage en Esperanto.

Adreso - Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtfako 46, PL-00950, Warszawa, Pollando.

:Ĉina E-kurso perradia rezultigis la vendadon de 5 000 lernolibroj.

:La eŭroparlamentano, M von Alemann de la germanaj liberaluloj estis publike demandita pri la lingvaj problemoj en la Eŭropa Komunaĵo. Inter la 35 ĉeestantoj estis ok Esperantistoj sub la gvido de Helmut Klünder, prezidanto de GEA. La parlamentano informis, ke ne plu imageblas, ke la angla kaj/aŭ la franca estos oficialaj lingvoj por la Eŭropa Komunaĵo, kontraŭe al tiaj revoj antaŭ nur kvar jaroj. Ĉar la diversaj lingvoj devas esti samtajtaj, ekzistas nur neŭtrala solvo kiel Esperanto.

:Konstatiĝis el la 1904-a kaj 1905-a "La Tutmonda Jarlibro Esperantista" (eldonita de Hachette en Parizo), ke la fama franca verkisto Jules Verne estis membro de la Esperanto-Grupo en Amiens.

:En la Brita Parlamento Lordo Brigenshaw intencas proponi al siaj gekolegoj parlamentan debaton pri internacia komunikado kaj Esperanto.

:Demonstracio en Hago, Nederlando kontraŭ nukleaj armiloj estis partoprenata de 550 000 homoj. Ĉeestis ankaŭ Esperantistoj kun internacilingvaj slogantukoj - estis pli ol 70 personoj el 4 nacioj.

ESPERANTO-EDUKADO INTERNACIA - NOVAJ PROGRESOJ

- :Laŭ la decido de la Eduka Ministerio, ke Esperanto povas esti instruata kiel unu el la nedevigaj fremdaj lingvoj en altlernejoj, nun pliaj naŭ altlernejoj ekfunkciigis Esperanto-kurson. La Administra Komitato de la Anhui Universitato decidis fondi lastjare kurson en la fakultato de fremdaj lingvoj. La kurso daŭras unu jaron kaj ĝi havas mil membrojn.
- :En Francio pli ol 200 studentoj kaj profesoroj de la Clermont II Universitato petis pliampleksigon de la libervolaj E-kursoj.
- :Kadre de la normala horaro, gejunuloj de la supera klaso en Villingen-Schwenningen lernas Esperanton du horojn ĉiusemajne.
- :Lernejoj en la israelaj urboj Jerusalemo, Tel-Aviv, Kfar Saba kaj Megido nun ofertas E-kursojn.
- :Dank' al la konstanta subteno de ĉiuj edukaj instancoj en Kielce, Pollando, la instruado de Esperanto daŭre progresas. En novembro 1983 oni inaŭgiris jam por la 12-a sinsekva jaro E-lektoraton en la Pedagogia Altlernejo.
- :La 1983 11 15 okazis ĉe la Kantona Liceo en Bellingzona, Svislando inaŭguro de dokumenta centro pri Esperanto.

El INFORMILO (Internacia Esperanto-Muzeo en Vien)

NOVAJ LIBROJ



:La vivo de d-ro L L Zamenhof en bildoj

Kompilita kaj eldonita de Henk Thien, fondinto kaj prizorganto de la Foto-Servo pri Zamenhof. La grandformata libro (A4) estas 128-paĝa dokumento pri la tuta vivo de la inicianto de la internacia lingvo. Oni povas sekvi lian vivon, jaron post jaro, kun la helpo de 114 elektitaj fotoj kaj 25 mapoj, presita sur luksa papero. Aperas ankaŭ konsiloj kiel uzi la bildlibron por artikoloj aŭ en klubvesperoj kie oni povas aranĝi kvizojn. UEA (Libroservo) estas la sola distribuanto kaj donas rabaton de unu triono por minimume tri ekzempleroj al la sama adreso. Prezo 30,00 ned. guldenoj.

:Esperanto katalogo 1984/85

La plej multpaĝa librolisto iam aperinta en la internacia lingvo. En ĝi troviĝas informon pri libroj, gramafondiskoj, kasetoj, sonbendoj, periodaĵoj, eldonejoj, aŭtoronomoj, kaj multaj aliaj diversaĵoj. Havebla de UEA (Libroservo). Nepre akiru!

ANONCOJ

:Alvoko al interesitoj: Por ricevi senpage Esperantajn broŝurojn pri Bibliaj temoj, legadoprojekto, ankaŭ

① studkurson, skribu tuj al - Internacia Biblio-

Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo

② — BH17 7LN; P.O. Box 373, Boronia, 3155 Vic.,
Australio.



:Nova plenkolora afiŝo havebla. Mendu ĉe la Libroservo de UEA po 13,50 ned. gld. Triona rabato ekde 30 ekzempleroj. Formato - 29 X 42cm. Vidu foton.

:Artikoloj por publikigo en BONA ESPERO estu ne pli longaj ol unu A4-formata paĝo. Sendu al la redaktoro. Ni bezonas ankaŭ vian kontribuadon.

:Olimpikaj ludoj viziteblas spirite: skribe aŭ interŝanĝante sonbendojn. Esperanto, 1888 Century Park East 1000, Los Angeles, CA 90067, Usono.

Lorjak: Eŭlalia. (Originala romano kies temo estas ridige amuza krim-historio.) Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1984. 192 p. 21 cm. ISBN 963 571 126 3.

Prezo: 21,- ned. gld.

Aperos en junio de 1984.



Gratulojn al RADIO POLONIO kiu la 4-an de aprilo pasis sian 25-an datrevenon de Esperanto-dissendoj!

Nove fondita grupo en Francio deziras publikigi turisman libreton en Esperanto. La loka turisma oficejo helpas finance nur se sufiĉe multaj personoj petos informon. Bonvolu skribi por interesiĝi al: Toursim Office, 6 Rue de L'Horloge, 22100, Dinan, Bretonio, Francio.

Esperanto Feria Asocio de Britio aranĝis du feriojn.

- a) Ekskurso al Internacia Esperanto-Kursejo, 200-lita tre luksa hotelo. (£285 por 2 semajnoj)
- b) Kvintaga Esperanto ekskurso, Belgujo kaj Nederlando. (£94)

Detaloj haveblaj de la redaktoro de BE.

: Aperis interesa letero pri Esperanto en Portelizabeta revuo. Petu kopion de - Algoa Sun, P O Box 1863, Port Elizabeth 6000. La letero

**Nova
plenkolora
afiŝo
havebla!**

Mendu ĉe la
Libroservo
de UEA:
13,50 (16,07 por
Nederlandanoj)
gld. por 10
ekzempleroj.
Triona rabato
ekde 30 ekz.


Esperanto
Internacia Lingvo



por agrablaj renkontiĝoj

Formato
29 x 42 cm.

Dvoraň Ladislav, 39102CS, Sezimovo Usti II,
Str. Khajence 675/A, Ĉeĥoslovakio. Radio-
amatoro kiu posedas aŭskultinon, sed anko-
raŭ ne elsendilon/deziras korespondi kun
amikoj en afrikaj landoj, usono,
anglujo, Aŭstrujo, Kanado, Italujo. L'inkpoto
Radioamatora numero OKI-31078.



Rudi Wetzel, 1055 Berlino, L.-Herrmann-Str. 36, GDR. 52-jara.
Eksintruisto kun interesoj - libroj, muziko, historio, k.c.

(Anoncoj: de p22)

estas afrikanslingva kaj verkita/ensendita de Adéle Fouché
de PEK.


:La gajninto de la R10-premion (Krucvortenigmo, BE 2/1984)
estas s-ro J Spoelstra de Potchefstroom. Gratulojn!
Vi ricevos vian premimonon post nelonge. La solvo estas -
Edvin de Kock.

:La 3-an de Novembro mortis s-ino F Holloway, 92-jara patrino
de nia sub-redaktorino Adéle Fouché. Elkoran kunsenton al
Adéle pro tiu grava forigo.

◆ ◆ ◆ ◆ ◆ ◆ ◆ ◆ ◆ ◆

(Trilingva artikolo: de p15)

can understand that. As in the years past, so also in the
year just finished, many of you worked with great keenness
and self-devotion for our mutual cause. To them the Espe-
rantist-group expresses its heartly thanks.



ISSN 0006-7024

SUD-AFRIKO SEA